# Konciza jarraporto IEspA 2023

*raportas: Marc Vanden Bempt*

La jaro 2023 estis la dua plena laborjaro de la Internacia Esperanto-Arkivo IEspA, oficiale fondita en la 25-a de januaro 2021.

Ni komencis la dokumentadon de arkivaj dosieroj, aldone al la libroj kaj revuoj. Ni akiris kelkajn gravajn arkivojn el Belgio kaj eksterlando kaj nova volontulino komencis aktive kunlabori. Krome ni ricevis gravajn mondonacojn kaj ekesploris konkretajn eblecojn por aĉeti arkivejon.

Ni decidis ekde nun uzi la mallongigon “IespA” anstataŭ “IEA”, ĉar ĝi egalas al la nomo iespa.eu de nia retejo kaj ĉar ĝi sonas kvazaŭ vorto anstataŭ simpla mallongigo. Tamen la nura oficiala mallongigo estas IEA, ĝis eventuala statutŝanĝo.

Fine de 2023 la kolekto konsistis el

- 8.083 plenaj revujaroj (de 988 titoloj) + (almenaŭ) 5.185 neplenaj revujaroj (de entute 1.493 revutitoloj).
  Miloj da duoblaj revunumeroj (ne ekzakte nombrate): minimume po unu (sed ofte pliaj) numero(j) el 5.622 revujaroj, aldone 1.042 bindaĵoj de po unu aŭ pluraj (duoblaj) revujaroj
- 14.743 libroj kaj broŝuroj (en 2024 ni atingos la psikologian sojlon de 15.000 libroj) + 13.477 duoblaĵoj (de 5.672 malsamaj titoloj)
- kelkdek bretmetroj nekatalogitaj de dokumentoj (jes ordigitaj laŭ dosieroj) + jam dokumentite 4.686 eroj en 237 dosieroj.

Duoblaĵoj: 1.887 dokument-ekzempleroj (de 913 malsamaj dokumentoj). Ni dubas ĉu indas konservi tiajn duoblaĵojn

- Objektoj: 5 filmoj deponitaj ĉe Cinematek (cinematek.be) + kelkaj m³ da objektoj poste katalogotaj.

Multe kontribuis al la IEspA-kolekto Petro De Smedt (Dendermonde), Katja Lödör kaj Hans Delnat (Gent) kaj Herman Deceuninck (Halle).
Aldone donacis erojn Patrick Haerick, Esperanto-Nederland, Jo Haazen, Barbara Brandenburg, Lode Van de Velde, Helena Van der Steen, Roland Rotsaert, Bert Boon kaj Kristin Tytgat.

Ni vizitis la centron en Herzberg, la Esperanto-grupon de Malmö (SE), Gunnar Olsson en Skövde (SE, transdonis la tutan posedaĵon de la tiea klubo kaj erojn el propra kolekto), la muzeon en Svitavy (Libuše Dvorakova, Marie Cumova, CZ), Stefan MacGill (Budapest, HU), Edit Klein (Budapest, HU) kaj la Dokumentan Esperanto-Centron DEC (Josip Pleadin, Đurđevac, HR). Ĉie estis interesaj priparoladoj kaj interŝanĝoj aŭ ricevoj de (multaj) libroj kaj revuoj.

IEspA, apud sia propra kolekto, ankaŭ daŭre administras la rekreitan bibliotekon de Flandra Esperanto-Ligo. Katalogoj: sekvu la ligon "Biblioteko" maldekstre en esperanto.be/fel.

IEspA proponas librojn kaj revuojn por vendo kaj interŝanĝo. Tiun eblecon ŝajne precipe interesas al alikontinentaj esperantistoj, kiuj plurfoje mendis erojn.

La kolekto estas ankaŭ plurfoje uzata de esplorantoj.

Formularo pri IEspA aperas nun en Archiefpunt.be, listo de privataj arkivoj kaj kolektoj en Belgio. Simila formularo aperas en collectiewijzer.be, indekso pri kolektoj de biblioteka heredaĵo.

IEspA akiris la oficialan identigilon BE-A4011, tiel nomatan ISIL-kodon, kiu unike identigas ĉiun bibliotekon aŭ similan organizaĵon en la mondo.

Ni komencis agadi por rekonigi Esperanton kiel nemateria heredaĵo en Flandrio. Nia dosiero kiel neoficiala nemateria heredaĵo (immaterieelerfgoed.be) estas preta kaj aperos publike en 2024.